



La Suda Kruco

Oficiala Organo de la Australazia Esperanto-Asocio
Fondita en Julio 1920.

Redakcio-Administracio :

Box 731F, Elizabeth-str: P.O., Melbourne (Aŭstralio).

Abono (por 12 numeroj):

Aŭstralio: 4 ŝilingoj kaj 6 pencoj. Ekster Aŭstralio: 5 ŝilingoj.

Redaktisto: Reginald Banham, F.B.E.A.

Specimena numero—unu respondkuponon aŭ 30 c. U.E.A. kupono.

Unu numero: 4 pencoj.

Anoncoj: Por 3 linioj: 1 ŝilingo.

N-ro 141 (12th Year) Melburno (Melbourne), Aŭstralio. 10 APRILO, 1932.

PRI LA RECENZADO ESPER- ANTA.

Frapas la serĉe legeman E-tiston la ĝenerale mizeraĵoj "recenzoj" pri Esperantaj verkoj. "La Suda Kruco" ricevas ĉirkaŭ dudek gazetojn el la ekzistanta ŝpeckelko, do la plej gravajn. Estas rajte diri, ke penindas legi la librokritikojn de nur ses. Supraĵeco, nezorgemo, banaldirado forte regas ĉe tiel nomataj recenzoj en la naciaj Esp. organoj. Malbonajn verkojn oni traktas per rutinaĵaj laŭdetoj, stereotipaj, ofte nesekvindaj rekomendoj. Aĉstilaj kaj gramatike eraroriĉaj presaĵoj pasas tre tro facile tra la manoj de mielbuse indulgaj redaktanoj, volantaj plaĉi al ĉiu trorapida eldonemulo.

Ĉefan valoron en la recenza fako havas sendube "Literatura Mondo," "Heroldo de Esperanto" kaj "Esperanto." La diroj de "The British Esperantist" estas preskaŭ ĉiam pike trafaj, sed multe tro mallongaj, sendetaj. La jam bedaŭrindege mortinta "International Language" konstante portis pensoriĉajn libroartikolojn kiel regalon antaŭ la okulojn de elektemaj leguloj. Modelo ĝi estis; ĝian ekzemplon imite sekvu tiuj naciorganoj disponantaj pri simila amplekso kaj paĝnombro. Tiuj ĉi tro ofte plenigas siajn paĝojn per sekaj priskriboj pri temploj, naturaj belaĵoj, mezkalvitaj literatoroj propralantaj, bagatelaj neniongravaj naciaĵoj. Ĉu ne konsile iom lasi tion kaj anstataŭe donadi pli da meritata atento al la verkoj en Esperanto produktitaj je tiom de cerboŝvito kaj poŝofero?

Ni havas en la penso tri grandverkojn, nome La Biblion, "Jarmiloj Pasas" kaj "La Originala Verkaro de Dr-o Zamenhof." Krom la komitata

raporto bone verkita, kaj artikolo en "Esperanto," preskaŭ nenio serioze leginda aperis pri La Biblion en la tuta Esperanta gazetaro. Unu rimarkinda escepto estis la kompetentaĵo de pastro W. J. Downes, M.A., B.D. (Light on the Bible, Lumo sur la Biblion, Okt.-Nov., 1927, n-roj de "International Language"). Eĉ la neesperanta gazetaro pli pentre diskutis la majstraĵon en siaj kolumnoj (vidu ekzemple la influan londonan taggazeton "The Times," 28/7/27; "I.L." 9/27).

La duvoluma fortostreĉo "Jarmiloj Pasas," malgraŭ tio, ke "Heroldo" precipe petis por kompetenta, serioza konsidero flanke de la recenzantoj, ricevis la kutiman fluon da ventaj vortoj. Skizo de l'ĉapitraj titoloj, eta resumo de l'enhavo, rimarkoj pri la formato, paĝaro, teknikaj punktoj de l'eldonaĵo, nekritika admiro pri la imponeco de l'provo, kaj simila—jen ĉio. Krom tiujn de la nomitaj organoj, ni ne rimarkis ian konservindan studon pri la Haefker'a verko, kun la ebla escepto de kelkaj linioj el recenzo en "Internacia Pedagogia Revuo," de kiu gazeto oni rajtas atendi eĉ pli bonan.

Pri "La Originala Verkaro de Dr-o Zamenhof" oni povas simile aserti. Ekster la internaciaj Esp. organoj ni notis nur tiun de "La Progreso" (ĉeĥoslovaka Asocio E-tista), kiu evidente entreprenis recenzon post reserĉlaboro konvena al la tasko.

Pro la supredirita manko ni leguloj tiom pli tre bonvenigis renaskon de "Literatura Mondo," kaj kun streĉa atento spirite manĝas la pensigajn juĝtaksojn de nia literaturo aperantajn en ĉiu numero. For la recenzan banalecon, la infanan nenidiradon, frukton de l'mallaboremo kaj nekompetento.

CONSULT COLES & GARRARD PTY. LTD.

PENEGO POR SAVI VIVON.
Tradukita el "The Age" (29/2/32).
De P.H.

Aeroplano, radio, aŭtomobilo kaj ĉevaloj estis uzitaj por ebligi al doktoro 800-mejlan viziton en okcidenta Kvinslando lastan vendredon kaj sabaton. La doktoro estis la "aviada doktoro" ĉe Cloncurry, kaj la paciento estis rajdisto, kiun ĉevalo faligis en Suda Aŭstralio. La afero donas frapan ideon pri la distancoj, kiujn oni devas vojaĝi, kiam oni bezonas doktoran helpon en la internaj, vastaj, preskaŭ senhomaj lokoj de Aŭstralio.

Viro terure suferis, kiam ĉevalo forĵetis lin el selo kaj ankaŭ rulfalis sur lin, je sunsubiro lastan lundon, ĉe Clifton Hill bienego, Suda Aŭstralio. Indigeno sur ĉevalo rajdis dumnokte distancon de 60 mejloj kaj atingis la ĉefbienegan domon je tagiĝo. Tie li havigis al si freŝan ĉevalon kaj rajdis ankoraŭ plu 60 mejlojn por atingi la urbeton Birdsville: tie troviĝas misia hospitalo, kie deĵoras du flegistinoj, kiuj povas per radio voki aviadan doktoran helpon.

Unu el la flegistinoj forlasis Birdsville'on per aŭtomobilo je la 21a horo marde. Tre malfacile estis trovi la vojon tra la sablaj montetoj, ĉar ĝi preskaŭ elvidiĝis pro polva ventego. Fine oni devis halti kaj daŭrigi la vojaĝon denove post tagiĝo. La sceno de la akcidento estis atingita je la 7a horo, kaj la returna vojaĝo al Birdsville'a hospitalo estis sukcese farita je la 15a horo.

La sanstato de la paciento jam estis malbona. Oni per radio vokis la aviadan doktoron, sed malbonŝance la aeroplano, kiu kutime kuŝas ĉe misio de Cloncurry, estis for tiun tagon ĉe Normananton, sed finfine aviadisto kaj la doktoro forlasis Cloncurry'on je la 11a vendrede, kaj atingis Birdsville'on je la 16a horo, post flugo de 400 mejloj. La sanstato de la paciento multe plibonigis pro kuraco dum la nokto, kaj sabatmatene je la 8a horo li povis forlasi Birdsville'on aeroplane kune kun la doktoro kaj alvenis Cloncurry'on je la 13a.

La pacienton oni loĝigis en la tiea

hospitalo, kie la doktoro povas daŭre prizorgi lin.

Tiu ĉi vojaĝo de la aeroplano estis preskaŭ ĝis la ŝtatlimo de Suda Aŭstralio, super tereno plejparte el sablaj montetoj, kie troviĝas tre malmultaj homoj, kaj distancoj de pli ol 100 mejloj inter loĝloketoj estas oftaj.

TO OUR SUPPORTERS

Thanks for the following—

Mr. Wyatt, 4/6, July, '30; Mr. Cleary, 4/6, Apr., '33; Vivisection ad., 4/6; Mr. A. Cohen, 2/6, Jan., '30; Dr. F. Williams, 5/-, Dec., '32; Mrs. Laws, 5/-, Jan., '33; Adv., 2/-; Mr. D. Miller, 5/-, Jan., '33; Mr. C. Ballard (sales), 5/-; Mrs. Mumford, 3/-, Aug., '32; Mr. Lanyon, 4/6, July, '33; Mr. McPherson, 4/6, Mar., '33; Miss E. Carrick (sales), 6/-.—Total: £2/16/-.

KRONIKO.

Melbourne, Vik.—Ĉe la lasta kunveno antaŭ Pasko klubanoj bonvenigis f-inon Hynd, de la Bendigo'a grupo. F-ino Hynd mallonge raportis pri la progreso de la tiea grupo kaj forportis nian bondeziron.

En antaŭa kunveno nia fervora ano f-ino H. Bostock aranĝis konkurson en Esp-o, per kiu anoj sin ekzercis karalingve.

S-ro P. Hudson gvidas tradukan rondon, kaj iun vesperon f-ino Bostock legis al anoj la rezulton de la ronda laboro—iun rakonteton de la fama amerika novelisto O. Henry.

SUCCESSFUL SOCIAL.

The Masterton Group held its annual social evening on 16th February in the Y.M.C.A. Rooms, decorated fittingly for the occasion.

Mr. G. R. Sykes, M.P., Honorary President of the Group, presided over an attendance of 160, this being the fourth occasion on which Mr. Sykes has acted as our chairman. Items were rendered as follows:—Songs, Miss Jessie Taylor, Miss Doreen Jamieson, Mr. Wilbur Davies, Mr. B. Venner; recitation, Miss E. Bate; selection, Misses Blamires; musical monologue, Miss G.

MELBOURNE'S LEADING OPTICIANS.

Judd; duet, Miss Jamieson and Mr. F. Clarke. Accompaniments were capably played by Mrs. G. W. Perry.

Dr. N. H. Prior gave a talk on a trip through Europe, illustrating his remarks by film pictures of the tour. He spoke with enthusiasm of the Esperanto movement abroad. In a ten-minute speech, Mr. F. Pavlinovich, of Jugo-Slavia, demonstrated the euphony of fluently spoken Esperanto.

After a dainty supper, served by the ladies, dancing was commenced, the music for which was supplied by the Harrier Club Orchestra under Mr. D. Hooper.

The entire program was broadcast from 2ZD. The Masterton Group is to be complimented on this venture, for the cost was borne wholly by the group members. Judging from outside reports, the broadcasting of the program had the desired propaganda effect, and created an impression highly favorable to Esperanto.

ESPERANTO.

Brisbane Society.

That there had been considerable activity in the instructional work of the Brisbane Esperanto Society was disclosed at the annual meeting. Mr. M. Hyde, F.B.E.A., presided.

An outstanding feature of the period under review was the formation of an Esperanto class at the Postal Institute, as the result of a lecture entitled "Esperanto in the Postal Service," delivered by Mr. M. Hyde, F.B.E.A., before a representative gathering from all departments of the G.P.O. This class completed a course of study in record time, under the tutorship of Mr. Hyde. Satisfactory progress was also made by the class conducted by Mr. F. Simon at the society's headquarters. Visitors during the year were specially interested in the rapid progress of a blind student, who, with the aid of a Braille grammar, took part in the general work of the class. Students were now enthusiastically corresponding with Esperantists in foreign countries.

During the year lectures were de-

livered by Messrs. Hyde (travel talks), C. Kidd (lantern lecture, "Through Beautiful England"), F. T. Simon ("The International Viewpoint"), W. L. Baker ("Art"). Much interest was displayed in an exhibition of water-colour paintings by Mr. L. W. K. Wirth, and drawings by Mr. H. N. Love, on the evening of the "Art" lecture. Native legends entitled "Stories from Papua," were sent in by the Rev. A. H. Lambton, Gedulalara, Samarai, and were read at the meetings, as were also translated stories from Mr. C. C. Dornbusch, of Warwick, and Dr. Fox, U.S.A. Two publications of the "Brisbane Bleko" appeared. Several picnics, a "Queensland Tea," and the annual commemorative dinner (known as the Zamenhof Festo) served to provide opportunities for friendly conversational practice in Esperanto. Thanks were due to Radio Stations 4QG and 4 BC for their broadcasts of a commemorative speech by Mr. M. Hyde and a paper by Mr. C. Kidd on the occasion of the anniversary of the birth of Dr. L. L. Zamenhof, the inventor of Esperanto.

The financial statement showed a small credit balance.

The following officers were elected: Presidents, Mr. F. T. Simon; vice-presidents, Messrs. H. H. Hutton and S. L. Parry; secretary and librarian, Miss E. B. Carrick. A social committee was appointed.

[*"Telegraph,"* Brisbane, 21/1/32.]

FRENCH PRESIDENT AND ESPERANTO.

Louis Forest writes in "Le Matin" of 26th October, that the French President, M. Doumer, invited to breakfast the members of the International Chamber of Commerce. Among them was the president of the Paris Chamber of Commerce, M. Baudet, an ardent Esperantist. "Well," M. Doumer asked him, "Have you found a language by which to understand one another?" At that moment Mr. Faraker, the Australian delegate, was announced. M. Baudet immediately turned to him and there ensued a conversation in Esperan-

MELBOURNE'S LEADING OPTICIANS.

to, in the presence of M. Doumer, between the two Esperantists, who each cannot speak the other's mother tongue. (Per "Heroldo de Esperanto")

GEEDZIGA SOLENO

Vespere la 5an de marto s-ro Percy Holmes, prezidanto de la Melb. E. Societo, edziĝis kun f-ino Margaret Bryden. La soleno okazis en la Unitarian Preĝejo, East Melbourne, kaj inter la gastoj troviĝis kelke da E-tistoj. La geedziĝon solenis pastro William Bottomley, kiu mem estas entuziasma E-tisto kaj antaŭ ne longe starigis grupon inter la parohanoj. Feliĉa vivo al la geedzoj!

"BABILADO" FROM BRISBANE.

Mr. Jozef Major, a Hungarian Esperantist, called here on 15th Jan. en route for Japan. He bought text books, with the object of forming an Esp. class on board the "Tanda." At his invitation several of the Brisbane Esperantists visited him on the "Tanda," and Mr. Hyde addressed a group of passengers on Esperanto.

Mr. Hyde sent the following to the "Daily Mail," and it was published in the personal column on 28/1/32:—

"Among recent visitors to Brisbane was a Mr. Jozef Major, a Hungarian journalist, representing among other papers, the Cologne "Heroldo de Esperanto." Mr. Major speaks English, but expresses himself more readily in Esperanto. He contributed to the "Heroldo" several articles on his experiences in Australia and New Zealand."

We enjoyed the visit very much. Mr. Major had come from N.Z., where he held the post of Senior Master of French at St. Patriek's College, Wellington.

EN LA KONSILEJO.

Estas malutile, plu diskuti la demando. Duono de la konsilanoj estas idiota!—La prezidanto: Mi postulas retiron de tiu ofenda parolo.—Nu bone. Duono de la konsilano ne estas idiota.

"MINACO AL MONDPACO."

Sensacia eldonaĵo hina.

Venis al ni el Nanking la supremoma broŝuro, kiu estas, laŭ hina aserto, Esperanta traduko de sekreta petskribo de la japana ĉefministro Tanaka al la Mikado sendita prezente la 25an de julio 1927.

Estas preskaŭ nekredebla la enhavo de ĉi tiu rimarkeginda verko 53-paĝa. Ĉu ĝi estas vera, aŭ lerte farita falsaĵo de hina patrioto? La interesato juĝu pri tio, stude leginte la sensaciajn akuzojn faritajn kontraŭ la japana imperialismo, kiu, laŭ la anonima hina verkisto esperas pri preskaŭ senlima militekspansio.

Estas detala plano por retaro da japanaj fervojoj tie konsideroj pri la riĉa ekspluatebleco je ligno, oleo, karbo, fero, sodo, magnezio kaj aluminio, kaj pri la neceso lanĝi la monistemon en Manĉurio-Mongolio de argenta en oron.

Precipe interesa al aŭstralianoj estas la mencio pri la lanindustrio, kiun ni presas alikolumne. Ni forte konsilus al la japanoj ne ignori ilian devon konkurenci kun siaj rivaloj per mondskala uzo de Esperanto por efika dissciigado.

Kelkaj vortoj misuziĝas sence: eventuale (finfine); p. 18, pretendante (ĉu ŝajnigante?); kontroli (la vorto ne egalas la anglan "control, rule over"); volo (testamento). Nomante "valo" kaj "pozicio" neologismoj, la tradukinto evidente ne scias, kio estas tiaj.

Senpage havebla ĉe La Komitato por Internaciaj Rilatoj, 5 Mao-Tan Street, Nanking, China.—(Robo.)

LA SOLA SEMAJNA JURNALO EN TAGGAZETA FORMATO!

La E-tistaro konsciu pri ĉi tiu fakto kaj abonu grandare. Niaj legantoj varbas per faktoj: granda formato, semajna apero, ilustrita, 8-10-paĝa amplekso. Kun 7 specialaj aldonoj: Radio, turismo, muziko, literaturo, lingvaj studoj, virinoj kaj gejunuloj.

HEROLDO DE ESPERANTO
Koln, Brüsselerstr 94, Germanlando.
12 markoj germanaj per la B.E.A.
Londono.

CONSULT COLES & GARRARD PTY. LTD.

KORESPONDAJO.

N. en B. "Social Evening." Komparu Marta 187/3, "societoj." "kolegaj rondetoj." Ankaŭ "societa kunigo," "vespera festa kunveno," aŭ "festvespero." Se vi celas traduki "get-together evening" konsideru "amikig-vespero."

B. en To. We think Zamenhof translated "Fables of Anderson" from a German rendering of the Danish original.

Dobo en Ips. "Dostulo" is a press error for "postulo."

GAZETARO SERVO.

Mi jam aranĝis gazetaran servon, kiu celas prezenti al la gazetoj manuskriptojn ricevitajn per Esperanto el la tuta mondo, sed ne Germanujo, kaj mi petas pri kunlaboro. Bonvolu sendi al mi el negermanaj landoj memverkitaĵojn laborojn aŭ tradukaĵojn de gazet-sciigoj, kaj raportojn pri strangaj okazaĵoj, bonhumoraj aferoj, gravaj problemoj, interesaj travivaĵoj, pri lando kaj popolo, moroj, kutimoj k.t.p.—Noveloj, skizoj aŭ alia spirita proprajo povas esti uzata nur post publikigpermeso de la verkistoj—Ankaŭ interparoloj kun famaj personoj de la politiko, komerco, arto, scienco, k.t.p., estas bonvenaj por mia gazetservo. Por uzeblaj manuskriptoj mi pagas honorarion, do vi povos samtempe gajni monon kaj helpi al grava entrepreno, kiu per via kunlaboro evoluigos pli kaj pli kaj iam fariĝos ankaŭ profito. Bonvole sendu al F. W. Mischke, Redaktoro, Radeberg, SA, Germanujo.

ADRESLIBRO DE POLAJ ESPERANTISTOJ.

Jen grava eldonaĵo por korespondo kaj kontaktingo kun eksterlando. Sen-nombra estas la skribularo, kiu anoncas en ĉiu E. gazeto. Sed malfacile estas trovi ĝuste tiun homon aŭ temon, kun iu aŭ pri kiu oni dezirus interrilati—oni devas tiucele fingradi jarkolektojn de multaj E. gazetoj. Ĉi verko forigas, almenaŭ kiom koncernas Pollandon, tiun malhelpon.

Bedaŭrinde estas, ke la libro, destinita por nepoloj, estas ĉe la informar-

tikoloj verkita tute pollingve. Tamen la ĉefgravaĵo, la listo de 4060 adresoj kaj la laŭfaka indekso estas en Espo-Entute 208 paĝoj; prezo 3 Sv. Frankoj, plus 10 procent sendkosto, ĉe Johano Zwada, Warszawa, ul. Zaczisna 2, M.O. Czerniakow, Poland.

Kiu estas la plej rapida trajno en la suda duonsfero?

La Sidnejo-Melburna ekspreso. La 190 mejlojn kuŝantajn inter Albury kaj Melburno ĝi transiris laŭ meza rapideco de 47½ mejloj ĉiuhore.

INTERNATIONAL ESPERANTO "HOME."

Property of the Movement under auspices of the International Central Committee.

At Aspremont (Alpes Maritimes), in Southern France, some eight miles from Nice, is found an Esperanto guest house. It stands on ground of 30,569 sq. metres, has nine furnished rooms, and aims at providing simple comfort at moderate tariff to Esperanto tourists at all seasons. This enterprise is under the managership of Mr. and Mrs. Yelland, of London, but is the property of the Esperanto movement and controlled by the I.C.K.

TO PHILATELISTS AND OTHERS.

New postcards of Lichtenstein.

New official postcards with interesting views of the principality have just been issued by the postal authorities of Lichtenstein; the little State that attracts an ever increasing flow of tourists to the beauties of its territory. The new edition consists of two series of ten cards each, stamped 10 and 20 centimes and bearing beautifully reproduced scenes of the show places. The designs and photos, polished work of the well-known Viennese master artist Kosel, are printed in two colors, an innovation in this particular field of typography and philately. Of special interest is the use as an auxiliary lan-

MELBOURNE'S LEADING OPTICIANS.

guage of Esperanto, which language the Government of Lichtenstein first exploited in 1930 for its tourist advertising. Lichtenstein is easily reached from Switzerland, Germany, Austria and Italy, and also by tourists from other countries by reason of its situation on the railroad Paris-Vienna.

Robert Kreuz, of the Internacia Centra Komitato de la Esperanto Movado, 11 rue St. Mt. Blanc, Geneva, can supply them.

GOETHE CENTENARY Esperanto Folder.

From Wiemar, Germany's culture centre, comes a folder in Esperanto setting out the arrangements for the above centenary celebrations. It is indeed fitting that Esperanto, the universal auxiliary language, should serve as a means of drawing the minds and hearts of the peoples to this honored corner of Europe wherein lived for years Germany's greatest literary son and one of the world's most expansive thinkers. The Verkehrsverein, Weimar, Germany, willingly sends this souvenir to admirers of the poet or to those wishing to attend the festival, which runs from 20th March to the middle of September.

ESPERANTO ON THE MARCH.

Since our last issue we have learned—

That the great Polish newspaper "Krakova Kurjer Ilustrowany" (Illustrated Courier of Kracow), 300,000 readers and wide influence, prints regular information in Esperanto.

That the Lyons Town Council, president M. Herriot, ex-Premier of France, unanimously carried a resolution in favor of Esperanto being taught in the world's schools.

That the State publishing house at Odessa is preparing an Anthology of Ukrainian Literature translated into Esperanto.

That the September Congress of English opticians held in London unanimously passed a resolution favorable to Esperanto and formed a committee to further explore the matter. The review "The Optician" published a report on the congress in English and Esperanto.

That at Geneva the first international congress for motor-ways decided to give moral support to the proposal to use Esperanto as an auxiliary language.

That Cagnes-sur-Mer, between Cannes and Nice, has decided to follow Cannes' example. It has erected the first Esperanto street signs, "Halto por aŭtobusoj." Other signs will follow. The town council intends also to name a street after Dr. Zamenhof.

That Radio-station "Nice-Cannes—Juan-les-Pins" from 11 Dec. broadcasts on Esperanto. Talks in Esperanto will soon be heard from that station.

ERROR: P. 80, May, 1929, last line of col. 1. Put "to" before "sleep."

ERROR: P. 332, under heading "Esp. on the March" read "1910 transmissions." The larger figure relates to Esp. broadcasts up to the end of 1930. ing Room, Collins-st., post la 18da

NI REE,

insiste, petas ĉiujn ŝuldantojn, ke ili fine bonvolu pagi siajn abonojn. Ĉiu aparta admonilo kostas al ni nur perdono de tempo kaj plia mono.

ERROR.

Transpose on p. 333 line 2 with line 31.

KVAKERISMO KAJ PACO

Mi havas senpagajn specimenajn ekzemplerojn de literaturo (Esperanta kaj angla) pri Kvakerismo kaj Paco por disdoni.

Bonvole petu per ilustrita poŝtkar to aŭ letero. Ankaŭ mi sentus plaĉon ricevi nomojn-adresojn de eventualaj korespondantoj el plej malproksimaj mondpartoj.

DR. FRED. J. WILLIAMS,

Samarai, PAPUA.

(fratorganoj afable represu)

CONSULT COLES & GARRARD PTY. LTD.

EL "MINACO AL MONDPACO."
(vidu recenzon)

"Dum safo en Japanujo produktas nur du kinojn (kino estas 1½ funto) da lano pojare, ŝafo en Mongolio povas produkti ses kinojn. La Sudmanĉuria fervojo-kompanio faris multajn eksperimentojn, kiuj ĉiufoje konfirmis tiun fakton. Cetere la lano estas multoble pli bona ol tiu de Aŭstralio. Ĝia malalta kosto kaj alta kvalito kunigita kun ĝia abunda kvanto estigas Mongolion kaŝita fonto de granda riĉeco. Kiam tiu ĉi industrio estos pligrandigata per la faciligoj de fervoja disvolvigo, la tuta produkto pliigos almenaŭ dekoble. Ni ne lasas la mondon tion scii, timante ke Anglujo kaj Usono pro ĝi konkuros kun ni. Tial ni devas unue regi la transportadon kaj poste disvolvi la lanan industrian . . . ne nur por nia propra uzado sed ankaŭ por eksporti . . ."

IS IT REALLY SO WONDERFUL?

Some time ago a well-known pacifist, visiting Geneva, paid tribute to the wonderful skill in languages possessed by the diplomats at the League of Nations; he was specially struck by the excellence of the speeches delivered in English and French. He concluded from this that the auxiliary language problem was no longer of urgency.

We do not know whether or not this gentleman himself speaks English. In any case, he was not present at the last sittings of the council, when, in the discussions on the Manchurian situation, the ambassador from Tokio, at a most critical juncture, spoke in Japanese.

There have been occasions, also, when the British delegate, owing to the strange pronunciation used by a fellow countryman, has had to wait for the French translation of the speech in order to extract from it something of the content of the address.

Our observer rightly admired the talent and education of these men. professionals who have, by reason of long years passed in ambassadorial salons, learned to use, to a degree approaching perfection, the tongue of a great nation not their own. It would be indeed sur-

prising if the different Governments, with their varied resources, could not find in each country two or three people able to speak fluently in French or English.

At the same time he should not withhold a measure of his admiration from the modest secretaries whose exacting task it is to toil over reams of carefully numbered typewritten sheets in the preparation or correction of the official speeches.

Furthermore, our friend has overlooked those who sit in silence, although they may have the most important parts to play. The responsible statesmen or representatives of powerful political parties are not always linguists. Orators, maybe, in their own country, such are compelled to wear a gag while on foreign soil. Even M. Briand does not speak English, and, if the venue of the League were in Tokio instead of Geneva, how far would he get without an interpreter?

Those who have for years observed these League assemblies know full well that the opportunity for delivering speeches depends for the most part on the linguistic ability of diplomats, and that much of the muteness on the part of delegates is to be explained on no other ground than the inequality that rules in this matter; journalists would search here in vain for any political intrigue as the motive for this unfairness.

To the great Powers, strong on sea and land, still belongs the precious privilege of free expression in their own tongue, while the other nations must be content to voice their viewpoint in an idiom foreign to them.

During the discussions this has more than once proved a real injustice. I could give many instances. I let one suffice. A north-European Minister once confessed, after the sittings of an important commission, that he there put forward a certain proposal: "My secretary carefully prepared my French speech, in which the proposal was set forth in detail. All went well with me and the manuscript, but after my address there rose an eloquent statesman whose mother tongue was one of

the two official. In words of thunder he shattered my arguments. I would have replied to him and pointed out his fallacies, but how could I? I was impotent to improvise freely and inerrantly in the foreign language. It was impossible to ask an adjournment of the Assembly for the purpose of preparing a reply. My proposal, of course, was rejected. From now on I shall support Esperanto as a solution to the problem of language inequality. We need it."

If this is true of diplomatic assemblies, how much truer must it be of scientific congresses and popular international gatherings!

(Translated from the Esperanto of Dr. E. Privat, in December "Esperanto," Geneva.)

TRAFFIC SIGNALS IN ESPERANTO.

Thanks to the efforts of M. Cresp, gen. sec. of the Provencal Esperantist Federation and delegate of Universal Esperanto Association in Cannes (France), the council of that town has decided to use Esperanto in its traffic signal system. From now on every indicator table will be printed in French and Esperanto. The first such indicator post was set up on 9th January. Cannes, a town much frequented by foreign tourists, is the first place in France, if not in the world, to take this progressive step. Send a card of approval to s-ro Vial, Mayor of Cannes, Alpes-Maritimes, France.

—Heroldo de Esperanto.

MENCIOJ.

Ŝirkalendaro por 1932; eld. de Heroldo de Esp-o. This is more than a mere calendar. It is a booklet of useful information, short poems, laughable press errors, jokes, quips, and wisecracks. Well worth the 1/6. Get on the regular mailing list of this enterprising publishing house, one of the gamest we know, and so receive it early every year.

Esperanto-sigelmajloj en 12 lingvoj. So pretty that one almost grudges to use them! Printed in three colors. Ten sheets (80 stickers) cost 0.55 mark (say 3 reply-coupons); 100 sheets, 4.40 (about 4/6). Neniu korespondemulo povas seni ilin kaj la supran kalendaron, sur kiu li notu la eksped-datojn.

Westralian Esperanto Society, Perth, W.A. kunvenas ĉiusemajne. Prezidanto, s-ro H. Byatt, D.B.E.A.; sekretario, s-ro David Miller, 73 Berwick-st., Victoria Park, Perth. Komunikajojn al la sekretario.

Masterton Esperanto Group—Meet every Tuesday at 8 p.m. in the Y.M.C.A., Church-st., Masterton. Hon. President, Mr. G. R. Sykes, M.P.; President Mr. A. Dewar D.B.E.A.; Vice-Presidents, Mrs. McNab and Mr. B. Johns; Secretary, Mr. Howard Franks, 38 Worksop-rd. Visitors always welcome.

Auckland (N.Z.) Esperanto Societo kunvenas ĉiulunde je 7.30a horo vespere ĉe Nova Preĝejo Halo (New Church Hall), Newton Road. Prezidanto: S-ro J. S. Russell; Sekretario: s-ro Jas. P. Lauder. Komunikajojn al la Prezidanto ĉe 2 Pukenui Road, Epsom.

Melburna Esperanto-Societo, Prezidanto, s-ro P. Holmes, D.B.E.A.; sekretario f-ino V. Cox, D.B.E.A. Adreso, Box 731F, Elizabeth-st., P.O., Melbourne. Kunvenejo: Scots' Church Hall, 97 Russell-st. Marde vespere, je la oka horo. R. Banham, "Age" Reading Room, Collins-st., post la 18¹/₂a horo.

Sydney Esperanto Society. Kunvenas ĉiun jaŭdon de 8-10 pt. Ĉe dua etaĝo, "Manning Building," 449 Pitt Street, Sydney. Kontraŭ "Hotel Sydney" kaj apud la ĉefstacidomo. Prezidanto; s-ro E. A. Pryke, D.B.E.A.; Sekretario: s-ro Leslie E. Pfahl, 64 Brighton-st., Croydon.

Erisbana Esperanto-Societo kunvenas la 2-an kaj 4-an mardojn de ĉiu monato en salono de State Service Union, 59a Elizabeth-str.; proksime de konstruaĵo "State Insurance." Prezidanto: s-ro F. T. Simon. Vicprezidantoj: s-roj H. Hutton kaj S. Parry. Bibliotekisto: Oskar Behncken (Del. U.E.A.). Sekretario: fraŭlino E. B. Carrick, Office of Supt. of Telegraphs, G.P.O., Brisbane (Queensland).

Wellington Esperanto Club.—Meet every Tuesday, 8 p.m., in the Y.M.C.A. Willis St., Wellington. Visitors always welcome. President, Mr. E. C. Jack; Vice-President, Miss Coralie Smythson; Secretary, Mr. Bertram Potts, F.B.E.A. 34, Argentine Avenue, Miramar. Treasurer, Mr. L. E. Dust, D.B.E.A., Del., U.E.A. Write for book list.